# SINPREZENTOJ DE LA KANDIDATOJ 2025 AL LA KOMITATO

| | |
|---|---|
| **Raymonde Coquisart** | Mi lernis Esperanton en 1972 kaj multe agadis kadre de la franca movado organizante multajn grupvojaĝojn al Universalaj Kongresoj kaj estante plurfoje membro de komitato kaj estraro (interalie ĝenerala sekretario). Mi skribis artikolojn en kejkaj gazetoj kaj bultenoj kaj tre ege interesas min la fako Ĝemelaj Urboj. |
| **Romain Curis** | Esperantisto ekde 2021. Mi havas 25 jarojn. Mi ŝategas gramatikon, logikon, politikon, sciencon kaj informatikon. Mi ŝatus helpi la Esperantujon pliboniĝi. Ekzemple kreskigante la esperantajn ilojn kaj influojn sur la interreto. |
| **Pierre Gauthier** | Mi lernis esperanton en 1998. Post longa periodo kiel simpla membro de Espéranto-France, mi aliĝis al Esperanto-Francilio por prepari la KER-ekzamenojn en 2017-2018. Komitatano ekde 2019, vic-kasisto kaj reprezentanto de nia asocio ĉe Espéranto-France ekde tri jaroj, mi aparte deziras konigi la kulturan heredaĵon de la Esperanto-movado. Mi instruas Esperanton je la unua nivelo ekde oktobro 2022 kaj zorgas pri la mesaĝoj de nia asocio en la sociaj retoj X kaj Mastodono. |
| **Pascal Hébert** | Candidat sur la liste Espéranto en 2019 et en 2024 j'ai été membre du konsilio de EDE de 2019 à 2024 que j'ai souhaité ne pas renouveler en 2025 donc pas de cumul des mandats si j'intègre le comité de Espéranto île de France. J'ai passé le 27 novembre 2024 les test de QI de MENSA (Association regroupant les 2% des personnes les plus intelligentes) et j'ai réussi les test qui m'ont même classé parmi les 1% les plus intelligents. Je n'ai pas encore adhéré à MENSA mais si j'intègre MENSA cela pourrait me permettre de parler d'espéranto avec l'élite intellectuelle française. Concernant l'espéranto je tiens à préciser que je ne fait pas partie des gens (ils me semble hélas majoritaires chez les espérantistes) qui considèrent l'espéranto comme une fin en soi. Pour moi l'espéranto doit rester un moyen d'atteindre un monde plus fraternel. |
| **Didier Janot** | Mi eklernis Esperanton en 2004 kaj komencis agadi por Esperanto kelkajn jarojn poste. Mi zorgas pri nia retpaĝaro https://esperanto.paris kaj pretas daŭrigi. Aldone mi estas sekretario de ILEI-Francio (https://eventaservo.org/o/ILEI-Francio ), landa sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). |
| **Aleks Kadar** | Esperantisto ekde 1999. En Espéranto-France mi plurfoje estis komitatano, estrarano, eĉ prezidanto. Mi estis kandidato por la politika movado Eŭropo-Demokratio-Esperanto ĉiun fojon ekde 2004, do jam 5 foje. En UEA mi estis Komitatano kaj Ĝenerala Sekretario dum 6 jaroj. En Francilio mi strebas partopreni ĉiujn Esperanto-kafejojn kaj laŭeble regule la ceterajn eventojn organizatajn de nia asocio. Prezidanto de Esperanto Parizo Francilio ekde 2024, mi pretas resti aktiva en la komitato de la asocio. |
| **Aurélien Lestage** | Esperantisto ekde 2016, mi estas membro de tiu komitato ekde 2018. Mi deziras daŭrigi la laboron jam komencita por agi pri Esperanto en Francilio, interalie la plurajn agadojn pri junularo. Mi rekreis monatan junularan babilsesion kiu nun bone funkcias dank' al aliaj respondeculoj kaj mi nepre deziras fortigi aliajn junulajn agadojn kaj ankaŭ partopreni al diversaj aliaj eventoj por la movado. Ekster Esperantujo mi estas 30-jaraĝa biologisto. |
| **François Lo Jacomo** | Nask. 1954, emerita matematikisto kaj lingvisto, esperantisto ekde 1971, okupas nun plurajn postenojn en la Esperanto-movado (UEA, Akademio, Greziljono, EDE). En la francilia federacio, de pluraj jaroj mi gvidas kurson, kunorganizas nian partoprenon en foiroj kaj pretas daŭrigi kun limigitaj respondecoj. Kun pluraj helpantoj ni jam realigis kelkajn filmetojn kaj esperas ampleksigi tiun agadon tra sociaj retoj. |
| **Laure Patas d'Illiers** | Esperantisto ekde 2012. Emerito. Kunorganizas la kulturajn vesperojn. Verkas en Esperanto. Listestro 2024 de la politika movado Eŭropo Demokratio Esperanto. Delonge komitatano de la francilia federacio, ĝia sekretario ekde 2020. |
| **Viktoro Simonnet** | Esperanto estas mia familia lingvo jam de ĉirkaŭ 90 jaroj. Mi fariĝis franciliano komence de la jaro 2007 kiel studento pri komputorado. Poste mi laboris en tiu fako ĉefe en Francilio. Mi strebas partopreni eo-agadon laŭ miaj eblecoj en Francilio i.a. esperanto kafejoj, kulturaj vesperoj, organizado aŭ deĵorado en budoj ekzemple de edukada salono aŭ homarfesto. Ekster Francilio, mi partoprenis i.a. la lastajn Polan Esperanto Kongreson, Aŭtunas staĝon en Greziljono, Zamfeston en Lillo kaj planas partopreni la nacian kongreson en Nanto kaj en la UK en Brno. Ĉefe ekster esperantujo, mi kutimas sidi en diversaj asociaj komitatoj jam ekde kiam mi estis gimnaziano. |
| **Guillaume Vera Navas** | Mi esperantistiĝis en 2018, kaj estas komitatano de la francilia asocio de 5 jaroj. Mi volas daŭrigi respondeci pri taŭgaj projektoj laŭ ebleco. |